

## Sukcesa metodo por reverdigi la Sahel-zonon

Inter la sahara dezerto en la nordo kaj la tropika pluvarbaro en la sudo en Afriko trovigas la Sahel-zono kiu pro ghia uzo kiel farmlando pli kaj pli dezertighas. Por haltigi tiun dezertighon kaj por reverdigi la Sahel-zonon multaj programoj de internaciaj organizajhoj estis konceptitaj sed ili plej ofte ne alportis la deziratan sukceson. Ekzemple la plantado de arboj montrighis senesperiga malshparo de mono, ĉar 80 procentoj de la plantitaj arbetoj pereis.

Unu metodo de reverdigo tamen bonege funkcias. Ghin eltrovis antaŭ 30 jaroj la aŭstraliano Tony Rinaudo kiu venis tiam kiel fakulo por reverdigo al Nighero, unu el la landoj kiu trovigas meze en la Sahel-zono. Kiam li vidis unuafoje kiel tiam aspektis la lando, li estis shokita, ĉar chie li vidis sekighon kaj dezertighon. Sur la grundo oni mezuris temperaturon de 60 gradoj kaj estis multaj plantaj malsanoj kaj damaghighaj bestoj kiuj detruis la rikolton. Li spertis ke la plantado de arboj ne funkciis kaj li pro tio senesperis.

Unu tagon li survojis per sia aŭtomobilo kaj devis halti pro paneo de la pneŭoj. Kiam li chirkaŭrigardis li vidis la saman bildon kiel chie en Nighero - nur sekighintan landon, jen kaj jen malgrandajn arbustojn aŭ ghermajhojn de arboj kiuj elstaris el la sabla grundo. Kiel en multaj regionoj de la lando ankaŭ tie iam estis arboj. Tony rigardis la arbustojn kaj plantojn pli precize kaj malkovris ke sub la grundo estis multaj ghermajhoj kaj restoj de radikoj. "Ĉu eble en tiuj radikoj kaj ghermajhoj estas ankoraŭ vivo?", li demandis sin. Por ekscii tion li faris teston en la regiono kaj baris areon en kiu la bestoj ne povis forvori la ghermajhojn kaj la homoj ne povis kolekti lignon por fari fajron.

Post iom da tempo multaj plantoj ekghermis kaj kreskis. Sur la malnovaj trunkoj de arboj oni lasis nur la plej fortajn novbranĉojn kaj je la gherala surprizo jam post tre mallonga tempo rekreskis malgranda arbaro. Tio estis la remalkovro de malnova metodo por reverdigo. Oni nomis ghin "farmiste mastrumata natura regenerigho - FMNR".

Tony ekkonis la nekredablajn eblecojn kiuj malfermighis, sed por tio li bezonis la subtenon de la farmistoj en Nighero. Ankaŭ la registaron li devis havi je sia flanko. Komencighis longa vojaĝo. Oni ne povis kredi ke per tiu simpla kaj malmultekosta metodo eblas reverdigi la landon. Sed post multaj prelegoj kaj vojaĝoj li sukcesis konvinki kelkajn farmistojn pri sia ideo kaj persvadi ilin fari provon. La farmistoj lasis laŭeble multajn arbojn kreski sur la kampoj kaj jam post mallonga tempo ili konstatis ke parte la rikoltoj duoblighis.

La arboj donacis ombbron kaj tiel protektis la semajhon kontraŭ la bruligantaj sunradioj. La radikoj kiuj etendighis multajn metrojn en la profundo konservis la humidecon en la grundo, birdoj revenis kaj disvastigis per siaj ekskremento semojn de aliaj plantoj kaj arboj. Oni ankaŭ konstatis ke shanghighis la mikro-klimato kaj ke ghi farighis pli humida kaj pli malvarmeta. Hodiaŭ preskaŭ la duono de la agrikultura grundaro per tiu metodo estas reverdigita. La farmistoj kiuj aplikis ghin nun decide pli bone fartas.

La branĉoj kaj folioj de la arboj estas rikolteblaj kaj povas esti vendataj kiel porfajra ligno kaj porbesta vorajho. Jen kaj jen farmistoj vendas arbojn kiel porkonstruan lignon. Tiel plialtighas la vivenspezo de la farmistoj kaj de tiu mono ili povas aĉeti nutraĵojn por siaj familioj.

Tony ne lacighis raporti pri la nova metodo ankaŭ en aliaj landoj. Li tiel chie revekis la konscion kiel gravaj arboj estas por sukcesa agrikulturo kaj por pli bona vivo. Afriko estas la kontinento kun la plej granda diverseco de arboj. Kreskas tie pli ol mil specioj. Multaj el tiuj arboj per siaj folioj sterkas la grundon kaj provizas tra la radikoj la grundon per vivnecesaj nutraj substancoj.

Tony povis konvinki multajn registarojn shanghi la koncernajn leghojn. En multaj afrikaj landoj nur la registaro disponas pri rajtoj je la lando kaj grundo. Sed nur se la farmistoj kaj komunumoj posedas la rajton je la grundo kaj la tie kreskantajn arbojn, tiam ankaŭ ili zorgas pri ili.

Ricevita de Herman Deceuninck, Naturamiko: <http://eo-naturamikaro.webnode.nl/>  
P.S. - Por pliaj informoj serchu: "Tony Rinaudo"